

みんなちがって、みんないい

Ĉiuj malsamas, Ĉiuj bonas

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

およそ十数年前、私は私塾の教師をしていた。その時、国語の教科書に出ていた詩に衝撃をおぼえた。

わたしと小鳥とすずと

わたしが両手をひろげても、
お空はちっともとべないが、
とべる小鳥はわたしのよう、
地面^{じべた}をはやくは走れない。

わたしがからだをゆすっても、
きれいな音はでないけど、
あの鳴るすずはわたしのよう、
たくさんのうたは知らないよ。

すずと、小鳥と、それからわたし、
みんなちがって、みんないい。

金子みすず [1903-1929] の詩である。今年はその彼女の生誕 100 周年に当たる。

私たちは日常、他人との比較で優越感を抱いたり劣等感にさいなまされている。優越感であれ劣等感であれ、人と人との間に障壁を作り、水平に連帯することを、つまり差異を認めながら共生することを不可能にするものにちがいない。

言語上の劣等感もそのひとつである。近年の異常な英語熱-英語第二公用語化論-は、英語ができないことによる強迫観念であるようだ。英語ができないことはちっとも恥ずかしいことではない、とエスペラントの思想は教えてくれる。

Ĝis antaŭ dek kaj kelkaj jaroj mi estis instruisto de kromlernejo. Tiam mi estis forte impresita de la poemo sur japanlingva lernolibro.

Mi, birdeto kaj tintilo

Etendante miajn brakojn,
mi neniel povas flugi en la ĉielo;
fluganta birdeto tamen ne povas
tiel rapide kuri sur la tero kiel mi.

Svingante mian korpon,
mi ne povas eligi belan sonon;
la tintanta tintilo tamen ne konas
tiel multajn kantojn kiel mi.

Tintilo, birdeto kaj mi;
ĉiuj malsamas, ĉiuj bonas.

Jen la poemo de Kaneko Misuzu [1903-1929]. Tiu ĉi jaro estas la centa jubileo de ŝia naskiĝo.

Ni ĉiutage fieras aŭ suferas pro supereca aŭ malsupereca komplekso. Tiu komplekso, ĉu supereca, ĉu malsupereca, faras baron inter homoj kaj malebligas nin solidariĝi horizontale, t.e. kunvivi aprobante inter si malsamecojn.

La komplekso en la kampo de lingvo estas ekzemplo. Lastatempa enorma furoro de la angla - la aserto, ke la angla estu la dua japania lingvo - verŝajne estas la obsedo pro nesufiĉa kapablo de la angla. Sed la ideo de Esperanto instruas, ke tute ne estas hontinde ne scipovi la anglan.